


Ngaio Marsh  
Novzelanda verkisto



# Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 2004  
Numero 67 (Vol. 12, #1)



# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 67 (volumo 12, numero 1), Januaro-Februaro 2004

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

Telefono: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝte: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

## Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

E-poŝte: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.

E-poŝte: [hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

## SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de Esperanto sub la Suda Kruco: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org); vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezono teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

## EN ĈI TIU NUMERO

### Artikoloj

Ret-adresoj de esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.....	3
Ĉu vere lingvo=penso? (Donald Broadribb).....	5
Articles for <i>ESK</i> /Artikoloj por <i>ESK</i> .....	8
Deziras korespondi.....	9
Trevor Steele demisiis.....	10
Kotiztabeloj, Ekzamenrezultoj.....	11
Interrete.....	12
Baza legolisto de la originala esperanta literaturo (William Auld).....	14
Nesto 2003 (Etulinka).....	16
Esperanto en Novkastelo (Franciska Toubale, Jonathan Moylan).....	19
For the Beginner.....	21
Vizito al Burrinja Artgalerio (Kam Lee, Franciska Toubale).....	25
La 90a japana kongreso de Esperanto (Paul Desailly).....	27
Odlo Bokserp.....	29

Nia kovropaĝa foto: Ngaio Marsh, 1895-1982, verkis 33 krimromanojn, kaj grandan aron da aliaj verkoj, eldonitajn inter 1927 kaj 1982. Ŝiaj krimromanoj kaj -noveloj estas internacie konataj kiel inter la plejbona verkaro de sia genro en la angla lingvo.

*ESK* estas legebla per Interreto, ĉe <http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por la venonta numero: 15 februaro.

# Ret-Adresoj

## Esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando

La sekvaj personoj sendis permeson publikigi iliajn e-poŝtadresojn. La korekteco de ĉiu adreso estis konfirmita en la fino de novembro-komenca parto de decembro 2003.

Ahrens, Rolf: rahrens@ecn.net.au

Andersen, Kay: kjand@ozemail.com.au

Audrey kaj Bob Felby: esperantobob@iprimus.com.au

Bishop, Jennifer: esperanto@Education.monash.edu.au

Broadbent, Henry kaj Betty: henryb@peninsula.hotkey.net.au

Broadribb, Donald: donbroadribb@westnet.com.au,  
sudakruco@sudakruco.org

Chaldecott, Margaret: gymea@hotmail.com

Couto, Igor: igor@pixelmedia.com.au

Esperanto-Federacio de Novsudkimrujo: esperfed@ans.com.au

Desailly, Paul: pdesailly@hotmail.com

Dewar, David: gddewar@ihug.co.nz

Ellyard, Marj: mellyard@austarmetro.com.au

Enderby, Kep: kependerby@bigpond.com

Friedman, Paul: paul.friedman@xtra.co.nz

Furness, Margaret: mfurness@bigpond.com

Gallagher, John: abcetc@ozemail.com.au

Gates, Ronald: rgates@metz.une.edu.au

Giloteaux-Else: Nicole: nicole@cryogenic.net

Grant, Alan: grantal@bigpond.com

Gravatt, Howard: hgravatt@ihug.co.nz

Green, Hazel: hazgreen@twmba.net

Green, Paul: pgreen@icr.com.au

Horton, Jo: johorton@paradise.net.nz

Horvath, Sandor: Sandor.Horvath@unisa.edu.au

Inglis, Margaret: minglis@netspace.net.au

Jones, Jim: JimJo@mullum.com.au

Kanaĉki, Svetislav: stevskank@hotmail.com

Kane, Daniel: daniel.kane@mq.edu.au

Krageloh, Christian: c.krageloh@auckland.ac.nz

Lee, Kam: kamleemelburno@hotmail.com

Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio: libroservo@ans.com.au  
Lloyd, Peter: peterlloyd@orcon.net.nz  
Loneragan, Owen: owlono@internetexpress.net.au  
Lukes, Dinanne: diannelukes@yahoo.com  
Lutz, Carol kaj Miranda: lutz@alphalink.com.au  
Manley, Terry: teren@mail.ans.com.au  
Massam, John: john.massam@multiline.com.au  
McCarney, Debra: debra1@iinet.net.au  
McDonald, Bradley: bradley.m@xtra.co.nz, brm.nzea@xtra.co.nz  
Mendelawitz, Alan, alano@global.net.au  
Monostori, Șandor: sandor@access.net.au  
Moylan, Jonathan: jonathan@eepjm.newcastle.edu.au  
Murray, Christine: cmurray4@iprimus.com.au  
Payne, Vera: vpayne@cygnus.uwa.edu.au  
Pehar, Zelimir: zpehar@hotmail.com, zpehar@yahoo.com  
Perkins, June: ronjuneperkins@powerup.com.au  
Pitney, Stephen: pitney@goldenit.net.au  
Purdy, Martin: translate@paradise.net.nz  
Pym, Penny: penivos@yahoo.com  
Quentin: vectorhugo@hotmail.com [Sed neniun e-poŝtaĵon sendu antaŭ la 1a de februaro 2004.]  
Rogers, Donald: donaldo@scientist.com  
Rolls, Ken: kenjohnrolls@yahoo.com.au  
Ryan, David: ryangomez@xtra.co.nz  
Somogyi, J.L.F.: Somogyi8@bigpond.com  
Sutton, Gwenda: gwenda.s@ihug.co.nz,  
Toubale, Franciska: franciska@bigpond.com  
Turvey, Edna: ednat@ans.com.au  
Wybraniec, Zbigniew: zbigniew@esperlando.zzn.com

Pluraj aliaj personoj specife petis ne publikigi iliajn adresojn. Diversaj kialoj ekzistas, la plej ofta kialo estas por eviti spamadon, ĉar spamistoj ofte serĉas e-poŝtadresojn por uzi ilin senpermeso; diversaj komputilvirus-dissendantoj simile kolektas e-poŝt-adresojn por povi plu dissendi siajn virusojn.

Ĉirkaŭ trideko da personoj ne respondis al nia peto permesi/malpermesi la publikigon de iliaj adresoj. Iliaj nomoj kaj adresoj ne aperas en la ĉisupra listo. Se iu el tiuj personoj, aŭ iu alia esperantisto loĝanta en la aŭstrali-novzelandana regiono, deziras publikigon, tiu bonvolu informi nian redaktoron por inkluzivo en ĝisdatigita listo. E-poŝtu al [suda kruco@sudakruco.org](mailto:suda_kruco@sudakruco.org).

# Ĉu vere lingvo=penso?

## Eseo de la Redaktoro

Kiam finiĝis la Dua Mondmilito, restis nur unu vere potenca industria nacio en la mondo: Usono. La antaŭe potencaj industrinacioj elĉerpis sin per militado: Britio, Germanio, Francio, Japanio. Britio pleje suferis, ĉar la Brita Imperio pereis. Per la helpo de Usono, Japanio refortiĝis. Iom post iom Germanio kaj Francio komencis reatingi sian antaŭmilitan industriiĝintecon. Sed la konkurado inter tiuj landoj, ilia dejarmila rivalado inter si kaj kun Britio, malebligis kombinitan industrian hegemonion.

Usono antaŭ la Dua Mondmilito estis grandparte sinizoligema. Sed pro la Milito la usonanoj ektrovis la ekziston de la cetera mondo; kaj la manko de grava industria rivalo donis al ili merkaton pri kiu ili neniam eĉ revis antaŭe.

Usono havis ĉ. ducentmilionojn da loĝantoj, ĝi estis pluroble pli granda ol ĉiu alia industrinacio. Kaj ĝia ekonomia sistemo kaj ĝiaj industrioj restis tute ne tuŝitaj de la Milito. Efektive, dum la diversaj partoj de Eŭropo daŭrigis en 1938-1945 sian tradician kutimon detruiri unu la alian, la diversaj partoj de Usono ĝuis internan pacon, amikecon.

La vasta uson-kanada kontinento uzis nur unu lingvon: la anglan. Estas vere ke ankaŭ la franca (en malgranda parto de Kanado) kaj la hispana (en kelkaj usonaj provincoj) estis konataj. Sed ĉiu indiĝene parolis la anglan. Same kiel en Aŭstralio, oni povis/povas aŭtomobiladi dum plenaj tagoj sen atingi alilingvan landon. Malsimile al la situacio en Eŭropo, kie la distanco inter la landobordoj nenie estas granda.

La multeco de lingvoj en Eŭropo (kaj en Afriko kaj en Azio) kontrastas kun la malmulteco de lingvoj en la amerikaj kontinentoj. En la Amerikoj ensume kvar lingvoj sufiĉas: ĉefe, la angla en Nordameriko kaj la hispana en Centrameriko kaj Sudameriko; krome la portugala en unusola regiono, Brazilo. Kaj la franca en malgranda parto de Kanado kaj manpleno da insuloj.

Pro sia historio de landapartigado, la eŭropanoj kutimiĝis al la sperto ke kiam oni veturas al alia lando, eĉ apuda lando (ekzemple, de Francio al Germanio), oni renkontas samtempe alian lingvon kaj alian kulturon. Kaj dumlonge oni trovis ankaŭ alian religian sistemon. Ankaŭe, dum la pasinta jarcento, kiam migris granda nombro da azianoj en Eŭropon, oni trovis ke la “pensmaniero” ŝajne varias laŭ lingvoj. Grandparte tiuj alilingvaj azianoj konis ne la kristanisman sed la budhisman aŭ islaman. La konkludo de la eŭropanoj, erara sed komprenebla, estis ke “onia lingvo” iel neeviteble paralelas onian mondkoncepton kaj eĉ onian pensadon. Pli simple, ke “lingvo=kulturo” kaj simile “lingvo=pensmaniero”.

En la Amerikoj, la sperto estis tute inversa. Inter la hispanparolantaj landoj en la Amerikoj troviĝas granda nombro da sendependaj indiĝenaj kulturoj, el kiuj multaj havas kelkmiljaran historion. Tutsimile, en Nordameriko gravaj indiĝenaj kulturoj ekzistis antaŭ la alveno de la angla lingvo, kaj tiuj kulturoj nun daŭras senĝene — uzante la anglan lingvon.

Paradokse, por la eŭropano, la sperto ŝajne montras ke “lingvo=pensmaniero”. Por la anoj de la Amerikoj, la sperto ŝajne montras ke “lingvo ≠

pensmaniero”. Alivorte: eŭropano emas supoziti ke lingvo determinas onian pensmanieron; anoj de la Amerikoj emas supoziti ke lingvo kaj pensmaniero estas tute sendependaj.

Simile malsamaj kredoj pri la interrilato de penso kaj lingvo ekzistas en la lingvistika mondo.

Ĝenerale, la tradicia (“diakrona”) skolo, kiu uzas la latingreke bazitan analizadon de lingvoj, antaŭsupozas ke lingvo=pensmaniero; dum la strukturisma (“sinkrona”) skolo, kiu komenciĝis en la unuaj jaroj de la dudeka jarcento, antaŭsupozas ke la pensmaniero estas tute sendependa de la lingvo, ke ĝi estas kondiĉita nur de onia kulturhistorio, sen rilato al la lingvo kiun oni parolas.

Popularaj kliŝoj ilustras la unuan vidpunkton. Fama ekzemplo estas: “La eskimoj per sia lingvo distingas inter dekoj da apartaj neĝspecoj, dum parolantoj de aliaj lingvoj sendistinge diras nur ‘neĝo’”. Evidente la eskimoj malsimile pensas pri sia medio, ol la parolantoj de aliaj lingvoj, diras unu vidpunkto.

Sed, respondas la alia vidpunkto, “se eskimo parolas kaj eskime kaj anglalingve, tio ne signifas ke lia pensmaniero pri la neĝo varias konforme al kiun lingvon li parolas. Neniel. Li povas egale facile esprimi anglalingve la samajn pensojn kiel per la eskima lingvo, laŭ la bezonoj kaj deziro.

Do unu vidpunkto kredigas ke la lingvo kiun oni parolas kondiĉas la pensojn kiujn oni esprimas. La alia vidpunkto diras ke oni trovas en kiu ajn lingvo metodon esprimi tiujn pensojn (konceptojn, ideojn, nomojn) kiujn transdonis/transdonas la tradicio.

Kiel ekzemplon de la dua vidpunkto, konsideru ĉi tion: Esperantistoj jam de pli ol jarcento emfazas ke per Esperanto oni povas paroli kaj legi kaj diskuti la spertojn kaj pensojn de homoj el ĉiu parto de la tero. Ni de tre longe insistas ke “Esperanto kapablas esprimi ĉies penson”. Kompreneble nur teorie.

En la nuntempa vortaro de Esperanto mankas vortoj por simple distingi inter “blanket”, “bedsheet”, “quilt”, kaj “underlay”; inter “toilet basin” kaj “bathroom basin”, kaj multaj aliaj ordinarajoj. (Kiun aparaton vi, ordinara okcidentulo, uzas kiam vi bezonas urini aŭ feki? Neniu vorto por “toilet” ekzistas en Esperanto! Ni havas nur eŭfemismon por certa ĉambro, “necesejo”, sed tute neniun nomon por la aparato kiun oni uzas en tiu ĉambro!) Samprobleme: kiel esprimi “diaper/nappy” en Esperanto? Kiel paroli pri “hamburger”, “hot dog”, “junk food”, “cordial [drink]”? Neniu el ili havas simplan klaran distingan nomon en Esperanto.

Ĉu tio signifas ke ne ekzistas tiuj konceptoj kaj kulturaj spertoj inter la parolantoj de Esperanto? Evidente ne.

Kompreneble tiuj esprimoj povus ekzisti en Esperanto; kaj jen la kerno de la afero. En ĉiu lingvo povas esprimiĝi ĉiuj kulturaj/materialaj/spiritaj sperto kaj spertaĵo. Sed en neniuj lingvoj nuntempe ekzistas tradiciaj terminoj por ili ĉiuj. Tial oni erare supozas ke la lingvo determinas la pensojn, ĉar multaj personoj erare supozas ke por havi koncepton oni nepre devas havi

vorton por esprimi ĝin. Sed konceptoj mem ekzistas en la menso de la homo sendepende de la parola lingvo. Oni unue konceptas, oni poste esprimas per vortoj. Tion montris la psikanalizaj esploroj multfoje.

Kio do okazas kiam esperantisto, kiu ne kapablas plene uzi la esprimkapablojn de la lingvo Esperanto, verkas aŭ parolas? Nu, la praktiko montras, ke tiu per gestoj aŭ aliaj korpesprimoj indikas siajn dezirojn kaj ideojn. Sed samtempe li sentas frustrigon: ne ĉar la lingvo ne kapablas esprimi tion, kion li celas; sed ĉar li ne lernis la rimedojn kiujn la lingvo povas uzi por tia esprimado.

Same estas, negrave kiun ajn lingvon uzas individuo. Japano aŭ ĉeĥo povas esprimi siajn japantradiciajn aŭ ĉeĥtradiciajn pensojn anglalingve, kiam li parolas per la angla lingvo. Problemo ekekestas kiam la parolanto ne sufiĉe lernis la anglan lingvon por koni la vortojn kaj gramatikajn formojn necesajn por esprimi siajn pensojn.

Mi diras ĉi ĉion, kvankam la leganto sendube jam tute bone konscias pri ĝi. Mi faras tion ĉar mi havas specialan celon:

Jam de pluraj jaroj Universala Esperanto-Asocio forte propagandas kontraŭ la angla lingvo. Ĝi proklamas ke se oni lernas paroli usonanglalingve, oni konsekvence pensadas “usonmaniere”, kaj tiel perdas siajn proprajn “kulturon” kaj “pensmanieron”.

Pro tio, UEA vigle partoprenas en la movado por “lingvaj rajtoj”. La ĉeftemo de la Universala Kongreso de Esperanto 2003 en Gotenburgo estis “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj”. Unu diskutotemo estis: “Ĉu ni povas ekspluati difinitajn nuntempajn politikajn evoluojn favore al Esperanto, ekzemple reziston al la influo de la angla lingvo en Eŭropo?”

Kial rezisti al la influo de la angla lingvo en Eŭropo? Ĉar, diras UEA, nur Esperanto, “kulture neŭtrala” lingvo, povas ebligi la konservon de la kulturoj de la eŭropaj popoloj.

Alia diskutotemo estis: “Kiel ni povas konvinki asociojn por la defendo aŭ disvastigo de naciaj lingvoj (Brita Konsilio, Instituto Goethe ktp) apogi Esperanton? Kiel ni povas trovi komunan intereson kun ili?”

Ŝajnas al mi ke:

La origina celo de Esperanto estis establi komunan lingvon. Ĉu aŭ ne apud tiu komuna lingvo ekzistas aliaj lingvoj efektive ne gravas. La homoj gravas; ili faras kaj pensas kaj esprimas tion, kion ili faras kaj pensas kaj esprimas, tute negrave ĉu per mil lingvoj ĉu per unusola lingvo.

Ĉio kio helpas interkomunikadon estas dezirinda. Ĉu temas pri lernado de la angla lingvo, de Esperanto, de iu alia lingvo, estas tute egale. Ni nepre ne estu ŝovinismoj, kiuj diras “Nur Esperanton aŭ nenion!”

---

### **Korekto por la Adresaro de AEA:**

Paĝo 17 Brisbane Esperanto-Societo:

Sek. Vakas

Paĝo 22 *Brisbana Babilado*:

Redaktoro : Alan Grant, 32 Abbey St., Forestdale Qld 4118

# Articles for ESK

*Esperanto sub la Suda Kruco* always welcomes contributions: preferably in Esperanto, although discussions of grammar or vocabulary, intended for beginning students of Esperanto, may be in English.

Articles sent as e-mail attachments are best written using Unicode.

If you are a Windows computer user, and write your articles with Microsoft Word, it is best if they are saved in Rich Text Format. Many users of Word are unfamiliar with the fact that when saving documents, they have a choice (in the "Format" section of the Save As sub-menu) of several formats, including Rich Text Format. Rich Text Format (RTF) allows your text to be read by virtually any computer, preserves the Unicode, and also all the normal format items (italics, paragraphing, etc. etc.), regardless of whether the reader is using Microsoft Word or some other program.

Articles may also be sent as ordinary e-mail text. If possible, use Unicode. Otherwise, use the x-system (cx = ĉ, gx = ĝ, etc.) or the h-system (ch = ĉ, gh = ĝ, etc.). Your editor can easily convert those systems to ordinary Esperanto script, using a macro.

Of course, we also welcome your texts on disks (again: preferably use RTF format); or on paper.

Macintosh computer users: if you are using system X (10.2 or 10.3), please write with Unicode. Mellel is the best program for this. (But also you can use Think Free Office, or TextEdit, or Nisus Writer Express.) Again, please use the RTF format. If using system 9 or before, use whichever method you are accustomed to.

## Artikoloj por ESK

*Esperanto sub la Suda Kruco* ĉiam bonvenigas kontribuaĵojn: prefere, en Esperanto, kvankam diskutoj pri gramatiko aŭ vortuzado, intencitaj por komencantoj, povas esti en la angla.

Estas plej dezirinde ke artikoloj sendotaj kiel e-poŝtaj kunligaĵoj estu verkitaj en Unikodo.

Se vi estas komputilisto uzanta Windowson, kaj vi verkas viajn artikolojn per Microsoft Word, plej bone estas surdiskigi la tekston en Rich Text Format (RTF). Multaj uzantoj de Word ne scias, ke kiam ili surdiskigas dokumenton, ili povas elekti (en la "Format-" parto de la submenuo de la Surdiskigu Kiel-Menuo) inter pluraj formatoj, inkluzive de RTF. RTF permesas ke vian tekston legu kia ajn komputilo, per kia ajn tekstprogramo. Ĝi konservas la unikodaĵojn, kaj ankaŭ la normalajn formataĵojn (kursivojn, alineojn, kc.kc.)

Vi povas ankaŭ sendi artikolojn kiel ordinarajn e-poŝtajn tekstojn. Laŭeble, uzu unikodon. Se tio ne eblas, uzu la x-sistemon aŭ la h-sistemon, kiujn la redaktoro povas facile konverti al la familiaraj esperantaj literoj per makroo..

Kompreneble, ni ankaŭ bonvenigas viajn tekstojn surdiskajn (denove: bonvolu uzi la formaton RTF); aŭ sur papero.

Uzantoj de komputiloj Macintosh: se vi uzas sistemon X (10.2 aŭ 10.3), nepre skribu unikode. Mellel estas la plej bona programo tiucele. (Sed ankaŭ uzeblas Think Free Office, TextEdit, kaj Nisus Writer Express.) Denove, bonvolu uzi la formaton RTF. Se vi uzas sistemon 9 aŭ pli fruan, uzu tiun metodon, kun kiu vi estas familiara.





# Por Ridigi Vin



## Edzobazaro

Ĵus malfermiĝis edzobazaro, kie virinoj povas elekti edzon el inter multaj havigeblaj.

La butiko konsistas el ses etaĝoj, kaj ju pli alten virino iras, des pli bonkvalitaj estas la viroj.

Tamen, kiam ŝi malfermas la pordon al kiu ajn etaĝo, ŝi devas elekti edzon el tiu sama etaĝo. Se ŝi iras malsupren, ŝi devas forlasi la butikon.

Do virino eniras la butikon por trovi edzon. Evidente ŝi ne estas tre kontenta pri sia nuna viramiko. Sur la teretaĝo estas afiŝo diranta:

*Teretaĝo, ĉi tiuj viroj havas laboron.*

Diris ŝi al si: “Tiuj viroj certe superas miajn ĝisnunajn amikojn, sed plaĉus al mi scii, kio troviĝas pli supre.”

Do supren ŝi iras laŭ la ŝtuparo.

La afiŝo sur la unua etaĝo diras: *Etaĝo 1. Tiuj ĉi viroj havas laboron, kaj amas infanojn!*

“Bone, eĉ bonege”, diras la virino al si, “sed kio estas pli supre?”

Kaj ree ŝi supren iras.

La afiŝo sur la dua etaĝo diras: *Etaĝo 2. Ĉi tiuj viroj havas laboron, amas infanojn, kaj estas belegaj!*

“Ha, eĉ pli bone”, ŝi diras al si, “sed kio troviĝas pli supre?”

La afiŝo sur la tria etaĝo diras: *Etaĝo 3. Ĉi tiuj viroj havas laboron, amas infanojn, estas belegaj, kaj ili helpas pri la mastrumado!*

“Ha”, elkrias la virino. “Tio tre tentas min”. Sed, devas esti eĉ pli bone pli supre”.

Kaj ree ŝi iras supren laŭ la ŝtuparo.

La afiŝo sur la kvara etaĝo diras: *Etaĝo 4. Tiuj ĉi viroj havas laboron, amas infanojn, estas belegaj, helpas pri la mastrumado, kaj estas bonegaj amorantoj!*

“Ho, mia Dio, imagu nur kio atendas min sur la kvina etaĝo”, kaj supren ŝi iras.

La afiŝo sur la kvina etaĝo diras:

*Etaĝo 5. Vi estas vizitantino n-ro 123.456.789.012.345 al tiu ĉi etaĝo. Estas neniuj viroj sur ĉii tiu etaĝo. Ĉi tiu etaĝo pravas nur, ke ne eblas kontentigi virinojn.*

*Dankon ĉar vi butikumis en Edzobazaro, havu bonegan tagon!*

[Laŭ Tamen Plu]



## Dezirata Korespondi



Jaroslav Kravchenko, n-1986, vul. Mendeleeva, 12-107, KIIV-103, UA-01103, Ukrainio; rete: [atilla2003@ukr.net](mailto:atilla2003@ukr.net).

Jaroslav estas studento de la Instituto de ĵurnalistiko. Liaj hobiaj estas: poezio, astronomio, filatelio, numismatiko.

# Trevor Steele demisiis

Trevor Steele estas inter la plej talentaj prozverkistoj en la historio de la esperanta literaturo, kaj ankaŭ bone konata kiel aktiva membro de nia Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Antaŭ iom pli ol du jaroj, Trevor Steele akceptis la postenon de Direktoro de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, situanta en la nederlanda urbo Roterdamo. Tiutempe UEA estis en granda krizo, kaj la anaro de preskaŭ la tuta Centra Oficejo ekŝiĝis. Ni ĉiuj esperis ke Trevor, kiu havas reputacion esti honesta, laboremega, kaj senpartia, povos ripari la malintegriĝantan ĉefasocion esperantan. Lia sukceso tiurilate estas unike granda. Sed, neatendite, en oktobro 2003 Trevor anoncis sian propran ekŝiĝon el sia posteno.

Trevor Steele klarigas: Mi venis al Roterdamo antaŭ preskaŭ du jaroj en epoko de grandaj problemoj pro demisioj. Mi kandidatis por la direktora posteno, ĉar ŝajnis, ke tiutempe la unua bezono ne estas administra talento/sperto sed la kapablo resti trankvila en stresa situacio. Mi ne ĉiam sukcesis resti trankvila, sed sufiĉe longe, mi esperas, por permesi pli bonan komencon al mia posteulo, ol mi mem havis.

Fakte mi kredas, ke kvankam la CO ankoraŭ estas en etapo de necesaj ŝanĝoj (renovigo de la domo, konvertado de la tro malnova komputila sistemo, nekompleta kolegaro), la perspektivoj estas nun pozitivaj.

Ĉiukaze mi intencis resti nelonge en la posteno, kaj antaŭ kelka tempo mi decidis demisii antaŭ la fino de mia kontrakto (aŭgusto 2005). Kial? Kiel mi skribis aliloke, mi “kulpigas” neniun alian, sed pro mia personeco mi nevolonte portas la ŝarĝon de respondeco por la funkciado aŭ nefunkciado de granda movado. Ecoj, kiuj helpas min verki romanojn, igas min senti min kvazaŭ birdo en kaĝo en la nuna situacio.

Mi tuŝis temon gravan por mi, kvankam ĝi eble ŝajnas vere frivola al aliaj: mi sopiras refoje verki, kaj mi scias, ke tio ne okazos, ĝis la kaĝo malfermiĝos.

Al Trevor ni dankas pro lia sindediĉa laboro por restaŭri la reputacion de UEA, kaj ni anticipas legi pliajn elstarajn romanojn kaj novelojn liajn.

[La teksto de Trevor Steele estas el  
Gazetaraj komunikoj de UEA]



## *Por Ridigi Vin*



La instruistino, f-ino Nazeg, donas lecionon pri religio: “Nu, infanoj, mi ĵus klarigis al vi ĉiujn plezurojn de Paradizo. Levu manon, se vi ŝatus iri tien.”

Ĉiuj infanoj levas la dekstran manon... escepte de Kruketo. F-ino Nazeg pridemandas lin: “Sed Kruketo, kial vi ne volas iri al Paradizo?”

Kruketo ploreme respondas:

“Mi ŝatus, sinjorino. Sed la panjo diris, ke mi devas iri rekte hejmen post la lecionoj!”

[El Ĝangalo]

# KOTIZTABELO DE UEA 2004

MG: Membro kun *Gvidlibro*: AŭD\$15.00

MJ(-T): Membro kun *Jarlibro*:1 AŭD\$37.00

MA(-T): kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*: AŭD 92.00

SA: abono al la revuo *Esperanto* sed sen membreco: AŭD\$55.00

Kto: Abono al *Kontakto* sed sen membreco: AŭD\$33.00

SZ: Societo Zamenhof (monapogo al UEA, sen membreco): AŭD\$184.00

Atentu: en la kategorio MJ(-T), persono ĝis kaj inkl. 29 jaroj ankaŭ ricevas membrecon en TEJO kaj la revuojn *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde*, sen ekstra pago.

---

## Kotizoj por la Universala Kongreso 2004

Pekino, Ĉinio

Pro eraro en la presado, la prezo de la Universala Kongreso 2004 en Ĉinio estis erare prezentita en folioj dissenditaj al la membroj de AEA/NZEA.

Jen la ĝustaj prezoj. Ĉiuj prezoj estas en Eŭroj:

Pagotempoj:	A	B	C
Por: Individua membro de UEA:	€ 150	€ 190	€ 230
Ne individua membro de UEA:	€ 190	€ 235	€ 280
Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individuaj membroj de UEA:	€ 75	€ 85	€ 115
Kunuloj/junuloj/handikapuloj ne individuaj membroj de UEA:	€ 115	€ 140	€ 170

Por koni la prezon en Aŭstraliaj dolaroj aŭ Novzelandaj dolaroj, necesas konsulti bankon kiam oni aĉetas transpagon al Nederlando. La kurzo ŝanĝiĝas ĉiutage.

---

## Sukcesis en la ekzamenoj

raportas Marcel Leereveld

*Sukcesis en la Baza Ekzameno:*

S-ro Tom Gleeson (NSW)

*Sukcesis en la Elementa Ekzameno, kun honoro:*

S-ino Nguyễn Ngọc Lan (Hanojo, Vjetnamo)

*Ni graulas la sukcesintojn.*



# Interrete



- **Ĉiumonate kreskas la ttt-ejo OLE** – Originala Literaturo Esperanta: <http://www.geocities.com/origlit/>. Mi nun aldonis paĝon, sur kiu troveblas la plej gravaj aldonoj lastatempaj: <http://www.geocities.com/origlit/novaj.html>.

Troveblas preskaŭ milo da dosieroj pri aŭtoroj kaj verkoj, plus centoj da bildoj kaj centoj da ligoj al eksteraj paĝoj interretaj. Informo: Sten Johansson

- **Ĉe <http://gxangalo.com/sudkruco/modules/news/>** vi trovos...ne, ne la retpaĝon de nia *ESK* sed tiun de la esperanta popmuzikportalo “Suda Kruco”. Kial ĉi tiu portalo/grupo/iniciato/diskeldonejo uzas nian nomon? Nu, ni ne scias, kaj ne multe gravas — ankaŭ tiu “Suda Kruco” estas sudhemisfera, ĝi lokiĝas en São Paulo, en Brazilo. Detalojn ni trovis en la revuo *Brazila Esperantisto* (Jul/Sep 2003). Ĝi informis ke la diskeldonejo Suda Kruco lanĉis 5-diskan kolekton, kun reprezentantoj de esperantlingvaj musikaĵoj el diversaj landoj. Oni povas konsulti fotojn de diversaj muzikistoj, oni povas elŝuti 49 MP3-dosierojn, trovi informojn pri venontaj eventoj, kc. Via redaktoro vizitis tiun retejon, kaj trovis pli-mapli ĉion nomitan en *Brazila Esperantisto*, kvankam li ial/iel malsukcesis aŭskulti/elŝuti muzikan dosieron. Eble vi estos pli sukcesoplena — se jes, bonvolu informi nian redaktoron pri la detaloj de via sukcesa provo. (Vi povas trovi vian redaktoron ĉe: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org), tiu estas la adreso ne de la muzikgrupo sed de nia revuo.

Ĉu vi estas konfuzita? Sendube ne nur vi...).

- **Klasikmuzika retpaĝaro ankaŭ en Esperanto:** En la retpaĝaro *Elegio* estas prezentata la trankvilastila, trista, bela muziko de komponistoj el diversaj tempoj kaj landoj. Estas konate, ke trankvilan, malrapidan muzikon eblas uzi kiel veran kuracilon. Eĉ ekzistas speciala termino — muzika terapio. Do, per la muziko el la retejo *Elegio* oni povas kuraci kaj animon kaj korpon. La adreso de la retpaĝaro:

<http://elegia.kominet.ru>

[fonto: Ret-info]

- **Ĉe [http://www.uea.org/dokumentoj/1bhh/reta\\_muzeo1.html](http://www.uea.org/dokumentoj/1bhh/reta_muzeo1.html)** troviĝas aro da interesaj dokumentaĵoj (afiŝoj, membro-kartoj, k.s.) el la historio de UEA. Interesas rigardi ĝin.

- **La retlegilo Mozilla nun parolas esperante.** La senpaga retlegilo uzeblas kaj per Windows kaj per Macintosh-komputiloj. Elŝutu ĝin, ĉe la adreso [www.mozilla.org](http://www.mozilla.org).

Instrukcioj por esperantigi ĝin:

1. Elŝutu Mozillan, kaj ŝaltu ĝin.
2. Per la nove funkcia Mozilla, iru al la retadreso [www.esperanto.org.uy/mozilo](http://www.esperanto.org.uy/mozilo).
3. Elektu la esperantigan programeton konforman al via nova Mozilla-programo. La esperantigilo aŭtomate instalos sin.

4. Malŝaltu kaj reŝaltu Mozillan.

5. En la “Preferoj” ĉe “Aspekto” elektu Esperanton; simile, ĉe “Navigilo>lingvoj” elektu Esperanton kiel vian ĉeflingvon.

6. Malŝaltu kaj reŝaltu Mozillan.

La retlegilo Mozilla nun uzos Esperanton

- **Ne forgesu ke ankaŭ la serĉilo Google** ([www.google.com](http://www.google.com)) povas paroli esperante. (Ĉe Google, elektu “Preferojn” kaj en tiu panelu elektu la vorton Esperanto.)
- **Ankaŭ la retlegilo Opera por Windows** povas paroli esperante. Por elŝuti la specialan programeton por tio, iru al [www.federicozenith.net/docs/opera.html](http://www.federicozenith.net/docs/opera.html). Atentu ke malsimile al la retlegilo Mozilo, ĉi tiu esperantigo de Opera funkcias nur per Windows-komputiloj. La retlegilon Opera mem oni povas senpage elŝuti ĉe: [www.opera.com](http://www.opera.com).
- **Proksimume 600 Esperantaj bildkartoj diverstemaj** videblas ĉe la adreso [www/eventoj/hu/bildkartoj](http://www.eventoj/hu/bildkartoj). Vi trovos tre bele aranĝitan kolekton, kaj eble volos elŝuti kelkajn.
- **Ĉu vi ludas Skrablon?** Ĉe la adreso <http://skrablo.ikso.net> troviĝas vi povas ludi ĝin en esperantlingva versio, per Interreto. Konsultu la informojn ĉe tiu adreso por kontakti aliajn esperantistajn ludantojn kaj aranĝi perinterretan ludon.
- **La interreta dissendolisto “Per-Esperanto-Baza-Scienco”** daŭre invitas vin kontribui al la unua Printempo de PorSciencia Verkado. La ĉefaj celoj de la programo estas iniciati regulan kontribuon de Esperantlingvaj sciencistoj en la movada vivo, krei eblecon de sciencaj interŝanĝoj pere de Esperanto, kuraĝigi studentojn de la sciencaj branĉoj al lernado de tiu ĉi lingvo kaj montri la utilon de Esperanto en scienca etoso kaj cele al seriozaj aplikoj.

*Ni bonvenigas kontribuojn kiuj temas la fizikon, kemion, biologion kaj/ aŭ matematikon en nivelo komprenebla al studentoj de la unuaj jaroj de universitatoj. La kontribuoj povas esti revizio de scienca koncepto aŭ scienca priskribo de natura fenomeno. Ili devas esti origine verkitaj en Esperanto kaj povas enhavi eltrovaĵojn de aliaj artikoloj laŭ reguloj de scienca citado.*

*Preferindas ne kontribui per skribaĵoj temantaj pri lingvaj aspektoj de scienca apliko de Esperanto, filozofio aŭ historio de la scienco.*

*Porscienca Verkado bezonas ankaŭ vian kontribuon. Gravajn informojn pri Porscienca Verkado legu ĉe:*

<http://ĝangalo.com/modules/news/article.php?storyid=1037>

[http://www.tejo.org/uea/Tekstoj\\_Pri\\_Printempo\\_De\\_Porscienca\\_Verkado](http://www.tejo.org/uea/Tekstoj_Pri_Printempo_De_Porscienca_Verkado)

<http://www.bavaresperantoinfo.de/0303/aktuell47.htm>

[http://www.esperantio.net/heroldo\\_komunikas.php?numero=209](http://www.esperantio.net/heroldo_komunikas.php?numero=209)

<http://abonu.com/archive/info.tejo/200310/02032644.text>

<http://www.lists.most.org.pl/archiwum/esperanto/2003-October/000004.html>

<http://www.livejournal.com/community/esperanto/48527.html>

<http://academy2.2ch.net/test/read.cgi/gogaku/1064151119/>

[El Ret-Info 10.06.2003.]

- **Senpaga Esperanto-franca kaj inversa vortaro por Windows**  
elŝuteblas de:  
<http://www.freelang.com/freelang/dictionnaire/esperanto.html>.
- **Esperanto-programoj de la itala radio RAI** aŭskulteblas ĉe: <http://www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml>.  
Elsendo 20-minuta, nova ĉiun sabaton, ekde frue en decembro 2003. En la elsendo aŭskultita 5 dec. 2003 la temoj estis: kontraŭleĝa enmigrado, terorismo, kaj diversaj italaj problemoj, ekz. lokado de radioaktivaĵoj, politikaĵoj kc. Parolo klara, kvankam la itala intonacio estas tre rimarkebla.

---

## Baza legolisto de la originala esperanta literaturo

### POEZIO

AULD, William (red.). *Esperanta antologio*  
 AULD, W.; DINWOODIE, J.S.; FRANCIS, J.I.; ROSSETTI, R. *Kvaropo*.  
 AULD, W. *La infana raso*  
 BAGHY, Julio. *Preter la vivo*  
 BOULTON, Marjorie. *Eroj*  
 GIŜPLING, Mikaelo. *El sisma zono*  
 GOODHEIR, Albert. *Merlo sur menhiro*  
 HOHLOV, N. *La tajdo*  
 KALOCSAY, Kálmán. *Streĉita kordo*  
 KOCK, Edwin de. *Fajro sur mia lango*  
 KURZENS, Nikolai. *Mia spektro*  
 MAŬRA, G. E. *Duonvoĉe*  
 MIĤALSKI, Eŭgeno. *Plena poemaro*  
 MIYAMOTO Masao. *Invit' al japanesko*  
 MONTAGUT, Abel. *Poemo de Utnoa*  
 NEVES, FERNÁNDEZ, KAMAĈO, DEK. *Ibere Libere*  
 PENETER, Peter. *Sekretaj sonetoj*  
 PRIVAT, Edmond. *Tra l' silento*  
 RAGNARSSON, Baldur. *Ŝtupoj sen nomo*  
 ROSSETTI, Reto. *Pinta krajono*  
 SADLER, Victor. *Memkritiko*.

SCHWARTZ, Raymond. *La stranga butiko*  
SCHWARTZ, Raymond. *Verdkata testamento*  
SU, Armand. *Poemoj de Armand Su*  
TÁRKONY, Lajos. *Soifo*  
UNGAR, Krys. *Meznokto metropola*

## PROZA FIKCIO

BAGHY, Juio. *Sur sanga tero*  
BAGHY, Julio. *Viktimoj*  
BOULTON, Marjorie. *Okuloj*  
BULTHUIS, H.J. *Idoj de Orfeo*  
ENGHOLM, Stellan. *Homoj sur la tero*  
FORGE, Jean. *Mr. Tot aĉetas mil okulojn*  
FRANCIS, John. *La granda kaldrono*  
FRANSIS, John. *Vitralo*  
LUYKEN, H.A. *Pro Iŝtar*  
MATTHIAS, Ulrich. *Fajron sentas mi interne*  
MIYAMOTO Masao. *Naskitaj sur la ruino*  
NEMERE István. *Sur kampo granita*  
NEWELL, L.N. *Bakŝiŝ*  
OŬLAK, Vinko. *Jen la sablo de mia klepsidro*  
PIĈ, Karolo. *La litomiŝla tombejo*  
RIBILLARD, Jean. *Vivo kaj opinioj de Majstro M' Saud*  
ROBINSON, Kenelm. *Se grenereto...*  
ROSSETTI, Cezaro. *Kredu min sinjorino!*  
ROSSETTI, Reto. *El la maniko*  
ROSSETTI, R.; SZILÁGYI, F. *33 rakontoj: La esperanta novelarto*  
SCHWARTZ, Raymond. *Kiel akvo de l' rivero*  
SCHWARTZ, Raymond. *Vole... novele*  
STEELE, Trevor. *Sed nur fragmento*  
SZATHMÁRI, Sándor. *Vojaĝo al Kazohinio*  
SZILÁGYI, Ferenc. *Koko krias jam!*  
SZILÁGYI, Ferenc. *La granda aventuro*  
ŜIRJAEV, Ivan *Sen titolo*  
ŜTIMEC, Spomenka. *Ombro sur interna pejzaĝo*  
URBANOVÁ, Eli. *Hetajro dancas*  
VARANKIN, Vladimir. *Metropoliteno*

Ĉi tiu listo farita de William Auld aperis en lia libro *La fenomeno Esperanto*, kaj aktualigita de li post dek jaroj por *La Gazeto*.

# NESTO 2003

de Etulinka

*“La 9-an de Julio 2003, frumatene ie en ĝangalo apud NN grupo de nelokaj fanatikuloj efektivigis aŭdacan provon trovi Esperantan tendaron laŭ vojklarigo, kompilita de la organiza komitato kunaŭtore kun Susanin I.*

*“Persekutate de kularoj kaj pluvego, la grupo de frenezuloj renkontis same fidelajn al la Esperanto-movado kamaradojn, akompanataj de 2 indiĝenoj. La dua grupo vagadis dum jam 2 diurnoj, kio pruvas la altan kvalifikon de Susanin I. 'Lacigitaj de la longa vojaĝo kaj manko de suno, la turistoj aranĝis bivakon sur la bordo de Luĵ. Sendita esploristaro post multhora serĉado trovis la maskigitan bazejon de la esperantistoj zorgeme kovritan de eskadreto de elektitaj kuloj.'”*

La 10-an de julio 2003 komenciĝis NESTO — Naturista Esperantista Somera Tendaro, ie en ĝangalo sur la bordo de Rivero Luĵ apud Niĵnij Novgorod. De la 8-a ĝis la 10-a de julio 2003, en la Niĵnegorodan neston venis 29 homoj, 24 el kiuj volis iĝi la lastaj herooj. (Aliaj kvin formis organizan teamon kaj volis ke dum 7 tagoj la homoj havu eblecon loĝi en kaj kin la naturo. Pro tio la plej gravaj kondiĉoj de partopreno estis vegetarismo, maldrinkado kaj malfumado, kaj nudismo ankaŭ estis bonvena). Ĉiuj, kiuj decidis testi siajn fortojn kaj eblecojn en tiuj severaj kondiĉoj, estis dividitaj en 2 birdarojn, el ili 1 estis birdaro de “krokukoloj” (krokodilaj kukoloj, ĉar malmulte da personoj el tiu teamo bone parolis Esperanton).

De la unua tago, la du birdaroj konkuradis en bruligado de fajroj kaj estingado de incendioj, konstruado de nestoj kaj detruado de nestoj de malamikoj, kuirado de vegetara manĝaĵoj kaj montrado de sia feliĉo pro malesto de viando (ankaŭ ovaĵoj, laktaĵoj kaj drinkaĵoj). Por sukcese travivi tiun malfacilan periodon de nekutima vivo, la homoj ĉiutage preĝis al sankta arbo, kiun ili kun koroj ekhaltantaj nomumis kun medaloj “Gajninto”. Laŭ la ĉefa ideo de la tendaro, post ĉi semajno la nestanoj devis havi multegajn sciojn kaj konojn de travivado en la severaj kondiĉoj de la sovaĝa naturo.

Pro tio, multaj taskoj estis ligitaj kun orientado en la arbaro, transsendado de informo per lumsignaloj, movado en interkruciĝa loko kun fermitaj okuloj nur sekvante la komandojn de samteamanoj pere de send–riceviloj. Ankaŭ por defendi sin de probabla iu, la birdaranoj pafadis el pafarkoj kaj laserindikiloj, ĵetis lancetojn, kaj kamuflis sin en malfermita loko. Ni povas konstati ke la homoj venintaj al nia tendaro estis bone preparitaj por obstakloj korpe kaj anime, kaj malsukcesoj ilin absolute ne konfuzis. Imagu, kiam orientinte sin en la arbaro ili anstataŭ horloĝoj, filmoj, kalkuliloj kaj suko (kion ni ne tro bone kaŝis) trovis militan bazejon kun manoj plenaj de gasmaskoj kaj grenadoj (certe ĉiuj objektoj estis porinstruadaj).

Al la Niĵnegoroda nesto kun siaj gepatroj venis 5 infanoj de 1 ĝis 6 jaroj. Por ke ili pli frue kaj facile ekdormu vespere, la birdaranoj kreis novan ĝenron de nokta fabelo: “laser-spektaklo”. Jen estis la tasko: la teamanoj ricevis ĉiu po laserindikilo kun 10-12 kapoj, donantaj diversajn desegnojn, kaj uzante ju pli multe des pli bone da ili, la birdaranoj devis montri kaj rakonti fabelojn.



Mi ĝis nun memoras duonhoran fabelon pri juna paŝtisto, kiu volis iĝi kosmonaŭto, pro kiu Aleksandr Ōrustalev gajnis la solenan titolon de “Rakontisto-fabelisto de nesto”.

En la paŭzoj inter la kruelaj turmentoj, la nestanoj amuzis sin partoprenante la konkursojn en korpopentrado, naturkostumo, kaj figuro el sablo. Unuafoje en mia vivo mi vidis kial korppentritaj personoj dum 40 minutoj staris ŝultro al ŝultro apud kaj en malbrulanta fajro (sub tegmento) por savi la arton kontraŭ pluvegaj strifluoj. La plej kreemaj personoj de la tendaro iĝis Alisa Ŝoliceva el Ivanovo kaj Lera Puŝkarskaja el Dimitrovgrad.

Por ke la vivo en la tendaro ne ŝajnu al la nestanoj tro facila, ni organizis ankoraŭ unu septagan konkurson, “Ora Skribilo”. Ĉiu teamo devis ĉiutage skribi raporton pri la pasinta tago. La titolon, oran skribilon kaj la rajton komenci ĉi artikolon, gajnis Varja Muraŝeva el Sankt-Peterburgo. Ĉio estus tre bona, se ne tri grandaj problemoj de la tendaro ekzistus: Kuloj, pri kiuj vi jam legis; pluvoj, kiujn mi jam menciis; kaj rivero, kiu paŝon post paŝo strebis okupi la grandan fajrlokon. Eĉ la vortoj de Lena Alopina, kiu ĵus revenis el Karelia kaj diris: “Tie estas multe da kuloj, sed estas ankaŭ lokoj, kie ili malnombriĝis, nu, kiel ĉi tie” — nin ne konsolis.

Kaj finfine ni komprenis, kial tio okazis! Kiam ni venis al la loko, ni plene forgesis amikiĝi kun la Dioj de Froliŝi — Ĉu eblas sen tio loĝi en la arbaro? Pro tio la nestanoj festis “Ekvatoron” — en la mezo de la tendaro — tiumaniere: ni kantis himnon de bona vetero, donis oferaĵojn al la Kul-gecaroj kaj forpelis la malican spiriton el la rivero. Vi rajtas ne kredi, sed post tio eĉ la kuloj preskaŭ malaperis kaj ni sunbruniĝis kiel veraj ekvatoruloj.

Sed ne forgesu ke nesto havis la programon “La lasta heroo”, kio signifas ke la homoj partoprenis la programon por gajni la titolon kaj monsumon. Uzante la eblecon, membroj de niĝnegoroda klubo ‘Ĉapelo’ volas danki sian mecenaton: INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista), kiu subtenis la tendaron per multaj premioj. Vi ne povas imagi kiel facile estas fari bonan aranĝon, havante bonan mecenaton.

Laŭ la reguloj de la tendaro ĉio, kion faris la teamoj, estis pritaksita de la Libera Birdaro (la organizteamo). Inkluzive ĝustatempan vekiĝon, kuiradon, alvenon al programeroj, partoprenon, Esperantoparolon, k.t.p. Ĉi tie vi devas demandi: kiel eblas pritaksi Esperantoparolon, se ne ĉiuj posedas la lingvon?

Jes — respondos ni — ni trovis eblecon. Unue, ĉiumatene la birdaroj ricevis listojn de frazoj, kiujn ili devis uzi en teatraĵoj, dialogoj, rakontoj, “lumbildoj” post... 45 minutoj. Kaj se dum la unua tago ĉiuj teamanoj plenumis la taskon kune, poste nur nululoj kaj komencantoj rajtis ion montri aŭ prelegi, kaj neniu krom spertuloj el sia birdaro povis al ili helpi.

Ni ne nomis tion Esperantokursojn, ni diris Esperanteroj, kaj tiuj Esperanteroj finiĝis nur vespere, kiam ni kontrolis la “ellernadon” de tiuj vortoj kaj frazoj en mallongaj mallingvaj ludoj.

Certe al ni ege helpis la ĉeesto de Ivo Miesen en la striga nesto — li ruse nenion komprenis (aŭ pretendis tiel), pro tio eĉ la plej sindonaj krokodiloj post du-tri vanaj provoj komuniki kun li kraĉis kaj ekparolis Esperanton.

Reveninte al la teamo de la lasta heroo, ĉiutage dum la vespera rondo, la libera birdaro premiis la heroojn de la tago kaj donis al la teamoj diverskoloraj

poentojn. Neniu sciis, kion tio signifas, ĝis la fino de la tendaro.

Sed dum la lasta vespero, kiam ni anoncis ke ĉiuj partoprenos la elektadon de la lasta heroo, sed laŭ la reguloj li aŭ ŝi povas esti nur membro de la gajninta teamo, la homoj komprenis ke tio estis ne simpla afero.

Flava — poento de suno kaj leontodoj — doniĝis al teamo 1; ruĝa poento — poento de fajro kaj vespera ĉielo — al teamo 2; kaj verda poento — poento de arbaro kaj espero — al teamo 3 poentojn.

Laŭ la kvanto de fadenoj sur lignaj rondoj gajnis la teamo de krokukoloj, kaj duono de la voĉoj estis donita al Andrej Konopljanov el Dimitrovgrad, kiu iĝis la lasta heroo.

Andrej diris: “Tiu tendaro estis por mi ege grava afero. Dum la unuaj minutoj de ĝi, kiam ni serĉis la vojon en absolute nekonata loko sub pluvego, sen iu helpo aŭ gvidanto, mi eksentis min vere vireca.

Kaj tiu sento ne malaperis kun la tagoj: mia ambicio tiel vundiĝis, ĉar ni preskaŭ nenion trovis el la kaŝitaj aĵoj, ke post tio mi uzis ĉiun liberan minuton por iri kaj serĉi. (La areo de la ludo estis 5 km — rimarko de la aŭtoro).

Mi sentis fieron, kiam nia teamo gajnis en konkursoj kaj reĝuis la sentojn, kiujn mi ne havis ek de infaneco — partopreni kaj gajni. Tio signifis por mi des pli, ĉar mi nun havas trankvilan laboron kaj mi tre dankas.” La Niĵnegoroda klubo “Ĉapelo” dankas ĉiujn nestanojn pro ilia aktiva partopreno, ĝustatempaj vekigoj, bongusta kuirado, altnivela Esperantoparolado, sufiĉe agrabla vetero kaj nekredeble bona etoso.

Al ni ŝajnas ke ni faris la plej interesan kaj neordinaran someran esperantistan renkontiĝon. Ni esperas gastigi vin ĉiujn en nia nesto-2004, sed kie ĉi tio estos, ankoraŭ estas sekreto.

[El *Naturista Vivo* 4/2003.]



## *Por Ridigi Vin*



Juna viro, ĵus fininta la universitaton, atingas sian unuan laborpostenon en granda vendejo. La vendejestro gaje lin salutas, manpremas kaj donas broson, dirante:

“Via unua tasko estas purigi la plankon en la tuta vendejeto.”

La konsternita novulo:

“Tamen... mi ja estas universitata fininto!”

“Ho, mil pardonojn”, diras la estro, “mi ne sciis tion. Donu la broson, mi montru al vi, kiel oni tion faras.”

Lia: “Mi absolute rifuzas iri kun edziĝintaj viroj.”

Jozefina: “Brave, vi pravas!”

Lia: “Jes. Mi insistas, ke ili mem venu al mi!”

[El *Ĝangalo*]

# Esperanto en Novkastelo

## de Franciska Toubale:

Nova tradicio estas naskiĝanta en la juna Esperantoklubo de Novkastelo: partopreno en la ĉiujara evento de la urbo, nomita Fiesta, okazinta ĉijare [2003] la 18an de oktobro, per propono de Esperantokurso al homoj kiuj ankoraŭ ne konas la Internacian Lingvon. La interesatoj povis jam komenci la lernadon la antaŭan sabaton, la 11an, kaj daŭrigis la sekvan sabaton, la 1an de novembro.

Kun plezuro mi flugis al Novkastelo por instrui en la unua leciono. Dank' al la streboj de Jonathan, kiu diskonigis la informon per afiŝoj, artikolo en la loka ĵurnalo *Herald Newcastle*, aŭ per interŝanĝo kun asocioj kies celoj similas niajn, kiaj la Multkreda Asocio, dek du novuloj sekvis la kurson. Inter ili estis naŭ studentoj, do la aĝo estis pli malalta ol kutime en Esperantorondo. Ĝojigis min renkonti ankaŭ Betty kaj Bill Aulsebrookon, kiuj veturis de Bateau Bay por elmontri sian subtenon. La etoso estis vigla kaj amikeca.

Por okazigi tiun kurson estis uzita ĉambro en domo apartenanta al la urba konsilantaro, la Eko-Domo, kie loĝas Susan kaj ŝia filino. La tasko de Susan estas montri al la publiko, kiu rajtas viziti ĝin unufoje en la monato, kiel eblas vivi respektante la medion. Ŝi zorgas pri la ĝardeno laŭ la metodo nomita permakulturo, tio estas ke ŝi lasas la legomojn kreski je sia natura tendenco. Ĉe la fono de la ĝardeno staras bananarboj. Dekliveto ebligas naturan akvumadon kaj ansero fekundigas la grundon. Tie renkontiĝas Jonathan kaj Andrew ĉiun monaton. Parolante Esperanton kune, ili helpas prepari la domon por la malfermo al la publiko.

Tiu evento estis por mi oportuno malkovri urbon ĝis tiam ne konatan de mi. Malgraŭ la malfavora ekonomia situacio, pro la delokiĝo de la firmao BHP (Broken Hill Proprietary), la socia vivo ŝajnas esti sufiĉe vigla. La homoj povis amuzi sin kadre de la semajnfina festo Matara.

Mi admiris la belajn plaĝojn kies fajna sablo estas, aŭ almenaŭ estis, sendata al Havajo, sed la forta, malvarma vento ne donis al mi la emon naĝi en la maro.

Kun surprizo mi eksciis pri la tertremo kiu en 1985 mortigis ses homojn kaj grave damaĝis multajn konstruaĵojn.

Ni esperu ke ankoraŭ pli da homoj aliĝos al la sekvaj kursoj. Mi gratulas Jonathanon kaj lian helpanton, Andrew, pro iliaj entuziasmo kaj efikeco.

## de Jonathan Moylan:

Societaj novaĵoj: Je Dimanĉo, oktobro 19a, Fiesta okazis. Ni havis tablon ĉe Fiesta kaj kelkaj homoj interesiĝis pri Esperanto. Je la 3a horo ni iris al la PAN- konstruaĵo kaj instruis, kvankam nur Daniel, Josh, Darwin, Andrew kaj Jonathan ĉeestis. Ni kune skribis leteron al esperantisto en Brazilo (kiu jam respondis), kaj eble ni povos korespondi plu kun li.

Je Sabato, novembro 1a, nia ĉiumonata kunveno okazis. Andres, Jonathan, Daniel kaj la patro de Jonathan, Peter, ĉeestis. Ni ankaŭ atendis iun S-

inon Jacky Fillios kaj ŝian filon Daniel, sed ili ne trovis la domon. Ili intencas veni la venontan kunvenon. Ni daŭrigis la lernadon de la kurso kaj lasis kelkajn Esperanto-afiŝojn por Sue kaj Shani.

Aldone al la anonceto en la ĵurnalo de Novkastelo, estis plena artikolo pri mi, kiun mi ĉi tie retajpas (pardonu pro la krokodilado):

It was a book on his father's shelf that got 15-year-old Jonathan Moylan interested in Esperanto. "My father had learnt the language while he was at Melbourne University," Jonathan says, "but he hadn't spoken it for years. I borrowed the book and it got me interested." Within two weeks Jonathan was speaking Esperanto and using the internet to find fellow Esperantists in all corners of the globe. Admittedly he had a head-start with languages: his mother is Belgian so he has spoken English and French since birth. But Esperanto was designed to be easy to learn. Created by a Polish oculist in 1998, the language has a completely regular grammar and a small core vocabulary. When you take on Esperanto you are taking on a world-view, it seems. "I like it because it's politically neutral and is a truly international language," Jonathan says. "Studies have shown that, if you learn Esperanto, you can learn other languages more than twice as quickly." He says Hitler and Stalin had banned the language, but after World War II it enjoyed a surge of popularity. That died away in more recent years but the internet has given it a new lease on life. There are said to be two million Esperanto speakers and there is a whole library of books on the language — including a translation of the Harry Potter books — at Esperanto House, in Redfern. About a year-and-a-half ago Jonathan formed the Newcastle Esperanto Society, bringing together like-minded Esperantists in their chosen language. Jonathan has some other projects in mind too. "I have permission from the United Nations to translate their permanent pages and I'm looking at the idea of signs in Esperanto at international areas like airports," he says. If you always wanted to be multilingual but can't spare much time, give Jonathan a call.

Pro tiu artikolo, tri homoj kontaktis min. Unue, tiu S-ino Fillios telefonvokis kaj ŝi intencas lerni Esperanton. Mi ankaŭ ricevis telefonvokon de Gwenda Williamson de Novzelando, kiu deziris ke mi sendu al ŝi la artikolon. Ankaŭ, mi ricevis retmesaĝon de Remy Sproelants el Belgujo kiu deziris scii pli pri mia ŝildo-projekto. Mi rakontis mian revon al li kaj diris ke mi intencas realigi ĝin nur post 5 aŭ 6 jaroj, sed tio ne haltigis lin antaŭsendi la mesaĝon al la 'reago'- kaj 'uea-membroj'-retpoŝtlistoj. Ankaŭ S-ro Tony Peterson skribis al mi kaj plej vigle eklernas Esperanton nun.

Ni ĉiuj scias ke la NSKa Esperanto-Federacio estas tre malavara kiam temas pri nia grupo kaj ĝenerale, sed mi neniam atendis ke ili sendos al mi monon por ke mi povu ĉeesti la AEA/NZEA-kongreson en Brisbano venontan Januaron. La \$500 probable estos tro multa, do eble mi povos dividi la monon kun nova lerninto. Eble ni povos havi konkurson: tiu, kiu plej rapide lernas Esperanton ricevas subtenon por iri al Brisbano kiel premion. Ili ankaŭ

*(Daŭrigo sur paĝo 27)*

# For the Beginner

An Interesting Story and a Small Competition

*Read carefully the following interesting story. It contains a number of grammatical errors, but do not let that bother you...yet.*

Post mia vojaĝo al IJF en Italio, mi pripensis ŝpari monon. Kial? Ĉar mi volis vojaĝi al Svedio... Al IJK.

Multaj homoj en IJF diris al mi ke ili vojaĝos al Svedio, al IJK kaj demandis: “Ĉu vi iros al IJK, al Svedio? Tio estas proksime al Finnlando.” Kaj nun mi scias ke mi havas sufiĉe da monon por tio. Jes, unue per la ŝipo el Helsinko al Stokholmo. Sed post tio? lu rakontis al mi, ke aŭtobuso estas pli malmultekosta ol trajno en Svedio. Hmm...

Nun mi iras... Per aŭtobuso el Porvoo al Helsinko, kaj post tio per ŝipo el Helsinko al Stokholmo. Mi havas bileton al ŝipo, sed mi ne havas kajuton. Kie mi dormos? Nenie! Mi ne dormos dum la nokto. Venos longa nokto, negravas.

Finfine, mi estas en la ŝipo. Kion mi vidas... Homo el haveno... Bubo de Harley Davidson. Kaj nun, li volas min al li, kial? Eble mi iras al la sama tablo.

“Saluton! Ĉu vi memoras min? Ni vidis en haveno.”

“Jes, vi sidis kun via virino en sama ĉambro, ĉu ne?”

“Jes. Sidu kaj babilu kun mi. Ĉu vi volas trinki kun mi?”

Hmm, mi uzas malmulte brandon ĉitempe. Kion mi faros? Mi ne volas problemojn. Sed, eble unu, ne multe. Nur tiuokaze ke li aĉetos tion.

“Eble unu? Mi ofertas tion.”

“Bonega. Sed nur unu.”

“Ĉi tie estas kvindek eŭroj. Iru kaj aĉetu du ‘Jäger-maister’.”

Tio estas forta kaj malbongusta trinkaĵo...

“Ĉi tie estas la trinkaĵoj kaj ĉi tie estas restanta mono.”

“Ĉu vi prenis salajron por ke vi vizitis servictablon, promenis kaj kunportis niajn trinkaĵojn.”

“NE, tute ne. Ĉi tie estas via mono kaj ĉi tie estas la trinkaĵoj.”

“HO, vi bezonas iom da salajron. Ĉi tie, dudek eŭrojn.”

Ni babilis. Sed mi provis estis neŭtra kaj neŭtrala. Ĉar li havis iom da malkonkordojn kun lia virino.

“Bonan vojaĝon, al vi knabo.”

“Dankon kaj sama al vi ... Sinjoro, sinjoro, vi forgesis moneron de du eŭrojn!”

“NEGRAVAS!”

“Hmm, dudekdu eŭroj kaj unu malbongusta trinkaĵo... Ne, malbona. Kion nun? Mi devas promeni, ĉar mi ne havas lokon por dormo. Diskejo, sed mi

nur iomete amas muzikon de diskejo. Hmm... En “normala” diskejo estas knabinoj.

Nun diskejo estas fermita. Post kvar horoj mi estos en Stokholmo. Seĝo kaj tablo. Mi sidas kaj dormas iom. Sed, se mi dormas tre longan tempon... ili ĵeti min el ŝipo, bonega. Nun mi dormas...

Bonege, mi dormis malbone, ĉirkaŭ du horojn. “Stockholm-city terminal”, mi devas trovi tion.

“Pardonon, kie kuŝas ‘Stockholm-city terminal’?”

“Mi iros preskaŭ saman lokon. Sed mi lasos aŭtobuson unu bushaltejon pli frue. Kiam mi lasos aŭtobuson, post tio vi scias ke tio estas sekva bushaltejo.”

Ĉi jare mi vojaĝis en la Italio per aŭtobuso. Kaj nun, mi vojaĝas per la aŭtobuso en Svedio...

“Nun mi lasas aŭtobuson, sed rigardu, City-terminal estas tie.”

“Koran dankon kaj saluton.”

“Saluton.”

City-terminal estas granda domo. Nun mi devas aĉeti bileton el Stokholmo al Karlstad. Post tio, el Karlstad al Lesjöfors.

“Bonan tagon. Mi bezonas biletojn el Stokholmo al Karlstad kaj el Karlstad al Lesjöfors. Mi scias, ke mi devas sanĝi aŭtobuson en Karlstad, ĉar mi devas veturi al Lesjöfors.”

“Mi vendas nur bileton el Stokholmo al Karlstad.”

“Kial nur?”

“Ĉar Swe-buso ne iras al Lesjöfors. El Karlstad al Lesjöfors, iras alia entrepreno de aŭtobusoj.”

“Ĉu vi scias horarojn el Karlstad inter Lesjöfors?”

“NE! Tute ne. Ĉar el Karlstad al Lesjöfors iras alia enterpreno de aŭtobuso! Demandu en Karlstad.”

Linda sed malafabla funkciulo. Sed nun mi havas bileton el Stokholmo al Karlstad. Tie estas pordego 38.

Suno brilas, varmega tago. Buso estas varmega kiel saŭno kaj mi havas nur duonlitron da akvo. Tri horojn poste... Bonege, mi estas en Karlstad. Kaj nun mi nur ŝanĝas la aŭtobuson. Sed kiom longe mi havas tempon por tio?

Jes, mi havas grandan problemon. Mi estas en Mezsvedio, kion mi faras? Ĉitie ĉiuj parolas la svedan, kelkaj parolas la anglan kaj svedan, sed mi ne komprenas la svedan. Kaj mi komprenas nur iomete la anglan.

Kiel mi iros al Lesjöfors? Mi ne scias, kiom multe da kilometroj estas, el ĉitie al tie. Tie estas soforo de buso, mi demandas.

“Pardonon sinjoro, mi havas demandon al vi.”

“Diru bonvolu.”

“Mi ne scias kion tempon veturos aŭtobuso el Karlstad al Lesjöfors?”

“Ne iras. Ĉar nun estas sabato.”

“Granda problemo. Ĉar en Lesjöfors komenciĝas unu okazo hodiaŭ. Kion mi faras nun? Mi ne scias.”

“Rigardu, vi havas telefonon. Cu vi havas telefonnumeron de la okazo?”

“Dankon, bonega ideo. Jes, mi havas numeron. Mi telefonos al la Esperanto-domo.”

Kion mi diros tien, ĉar mi estas komencanto kun lingvo de Esperanto? Mia opinio nun mi bezonas mian vortaron. Mi faras pretajn frazojn antaŭ ol mi telefonos.

“Saluton. Mi estas Timo Pirinen el Finnlando.”

“Saluton Timo.”

“Mi estas problemo. Mi estas nun en Karlstad kaj mi havas problemo ĉar neniu aŭtobuso iros al Lesjöfors.”

“HO, ĉu vi bezonas veturigon?”

“Jes, mi bezonas veturigon.”

“Kelkaj aŭtoj iras ĉitie, Lesjöfors al stacidomo de Karlstad. Pardonon, mi forgesis vian nomon.”

“Timo Pirinen.”

“Dankon. Mi rakontas tion al nia ŝoforo. Nun vi bezonas promeni al stacidomo de Karlstad. Mallonga vojaĝo. Ĉirkaŭ 400 metrojn. Vi preskaŭ vidas tion.”

“Jes, nun mi kredas, ke mi vidas stacidomon. Koran dankon al vi.”

“Ne dankinde kaj bonvenon al IJK.”

“Dankon.”

Stacidomo de Karlstad. Mi estas plu en Karlstad, negravaŝ. Ĉar aŭto venos kaj kunportos min, al Lesjöfors. Sed kiu knabino ŝi estas? Ŝi promenas tien kaj reen... Ne, ŝi estas loka knabino. Sed se ŝi estas loka, kial ŝi havas grandan dorsosakon? Eble, ŝi estas Esperantinisto... Jes, ŝi kunportas nian flagon.”

“Saluton, mi pensas ke, vi parolas Esperanto?”

“Saluton. Jes mi parolas iom Esperanto. Mi pensis ke, mi estas sola, ĉitie.”

“Mi havis sama penso, en la mia kapo. Sed ne plu.”

“Ĉu vi atendas aŭto, ĉu vi scias kion tempon tio venos?”

“Mi ne scias. Mi telefonis post momenton al IJK kaj el tie?i diris ke aŭto iras nun. Sed mi ne scias ke, kiom multe da tempon Ŝoforo bezonas.”

“Do, ni atendas.”

“Jes, ni atendas.”

Bonege, nun mi ne atendas sola. Hmm... En Italio, mi trovis ankaŭ en stacidomo knabinon, kiu parolis Esperanton. Kaj nun, en la Svedio. Mi pensas ke, tio estas mia amuza destino. Nun, “novaj” esperantistoj venas el stacidomo.

“Saluton geamikoj!”

“Saluton! Ĉu auto venos?”

“Jes, laŭ mia scio.”

Ni babilas kune kaj atendas la aŭton. Kelkajn minutojn poste, aŭto venis.

Soforo de aŭto demandis ĉies nomon. Nun mi sidas en aŭto kaj sama babilo daŭras. Tio estis bona ideo telefoni al IJK. Ĉar mi havis longan vojon promeni. Aŭto veturas ĉirkaŭ okdek kilometroj per horo, tutan tempon. Kaj nun, mi sidis en la aŭto, ĉirkaŭ unu horon.

“Ĉi tie estas Parko de Esperanto kaj bonvenon al ALKO.”

Finfine, la IJK. Kiam mi vojaĝis el Porvoo al IJF, al Italio, mi bezonis nur ĉirkaŭ kvin aŭ ses horojn da tempo. Sed, amuza afero. Ĉar mi vojaĝis el Porvoo al IJK, al Lesjöfors mi bezonis ĉirkaŭ dudek horojn. Sed ĉitie estas sama animstato kiel en IJF. Ĉiuj homoj demandas: “De kie landon vi venas?, Kiom multe da tempon via vojaĝo daŭrigis?” K.t.p. Ĉiuj estas geamikoj kune. BONEGA!!!!

P. S. Dum la IJK, mi kalkulis miajn monojn kaj pripensis ke post IJK mi vojaĝas al UK, al Gotenburgo.

Timo Pirinen

(Reprinted from *Esperantolehti* 5/2003.)

## The “Little Competition”

The above story is an account by a beginner Esperantist, concerning a trip to the Internacia Junular-Kunveno (IJK) in Lesjöfors, Sweden, last year. The author makes a number of (mainly small) grammatical errors (and perhaps one or two in choice of vocabulary also). Your task is (1) to correct the grammar and (2) to translate the story into good English. We also suggest you change the punctuation to standard English punctuation, but you will not gain or lose any points for that.

### Rules:

1. You will gain one point for each correct grammatical correction, and up to thirty points for your translation into English.
2. To take part in the competition, you must have been studying Esperanto for no more than one year (twelve consecutive months), and all the work must be your own. You may not ask for or receive any help or suggestions from any other person.
3. You may consult dictionaries and grammar books as you see fit.
4. Mistranslations due to misunderstanding the Esperanto text will not be penalized.
5. All members of AEA or NZEA, and subscribers to Esperanto sub la Suda Kruco are eligible to enter, providing they meet condition 2 above.
6. Entries must reach the editor of *ESK* on or before April 10, 2000.
7. Send your entry by e-mail to [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org), or to Donald Broadribb, PO Box 364, York WA 6302, Australia.
8. Every entry will receive a book prize, to be chosen by the editor of *ESK*. The three best entires, as determined by the number of points allotted to the entries, will also receive a special extra book prize (also to be chosen by the editor of *ESK*).



# Vizito al Burrinja Artgalerio.

11-11-2003

de Kam Lee kaj Franciska Toubale

## de Kam Lee:

La 18-an de oktobro 2003, multaj melburnaj esperantistoj iris al Burrinja Artgalerio en Upwey, kiu lokiĝas en la orienta parto de Melburno. Oni povas admiri multajn belajn bildojn, kiuj plejparte esprimis la abstraktan vidpunkton.

Unu el la montrataj verkoj estis aro de ĉapeloj kiuj pendis per ŝnureto super la planko. Ni decidis sidi sub la ĉapeloj kaj kelkaj el ni provis ŝajnigi ke ni portas tiajn kapvestaĵon kiel montrate en la unua foto.



Supre: Kam Lee, Svetislav Kanaĉki, Franciska Toubale, Karl Egger, Marcel Leereveld  
Malsupre: Henry kaj Betty Broadbent, Bernie Heinze, Les Farkas, Alida Leereveld

Post kiam ni vidis la verkaĵojn, ni eniris en la kafejon kaj ni tagmanĝis. Estis multaj lokoj kie ni povus sidi, sed ni decidis sidi apud amfibia besto, kiu plejprobable estas krokodilo, kiel montrita en la dua fotoĵo.

Tia grandega reptilio troviĝas en la norda parto de Aŭstralio kaj ĝia korpo estas eble almenaŭ kvar metrojn longa. Ili ne estas aligatoroj — aligatoroj vivas nur en Norda Ameriko kaj partoj de Azio.

*Krokodil', ho krokodil',  
Kiu piediras sur la mur',  
Mi pentras vin per mia pentril'  
Ido de la dinosaŭr'.*

### **de Franciska Toubale:**

La Esperanto-Federacio de Viktorio elektis la ĝustan tagon por okazigi sian duan ekskurson de la jaro. Sabaton, la 18an de oktobro 2003, en komforta varmeco kaj sub brila suno, deko da membroj de la viktoria federacio renkontiĝis en la montaro Dandenong por kune viziti la artgalerion Burrinja.

Antaŭ la ministriĝo de Jeff Kennett, la loka konsilio kunsidis en tiu domo. Sed pro la tiama kunfandiĝo de pluraj lokaj konsilioj, la registaro ne pli uzis ĝin kaj deziris ĝin vendi. Dank' al la kontraŭstaro de kelkaj homoj, kiuj faris de ĝi renkontejon ĉefe por artistoj, ĝi nun ree apartenas al la komunumo.



Pro tio ke historie la virinoj ne havis la saman oportunon kiel viroj diskonigi siajn artaĵojn, tiu ekspozicio montras la verkojn nur de virinoj, ĉefe indiĝenaj. La paciencegaj artistoj mirige uzas teksaĵojn por krei ion kio aspektas kiel pentraĵo. Troviĝas ankaŭ kanvasoj kun viglaj koloroj. La temoj estas kutimaj en indiĝenaj verkoj: la bestoj, la plantoj, kaj ankaŭ fajro.

Aldoniĝas kelkaj skulptaĵoj kiuj devenas de Novgineo, kiel atestas la uzo de Birdoj de Paradizo, alte respektataj bestoj en tiu lando.

En la kafejo Uncle Neil's Place, kies etoso estas aparta pro la artaĵoj kiuj ĝin ornamas kaj pro la postlasitaj spuroj de la multnombraj muzikistoj kiuj

ludas aŭ kantas tie semajnon post semajno, ni gustumis bongustan manĝaĵon, aktive babilante. Estas sciata ke esperantistoj ne povas sin reteni de tio.

La ekskurso finiĝis per agrabla promenado ĉirkaŭ la lagoj de Birdsland, parko kiu troviĝas en la apudeco de la artgalerio Burrinja.

---

## La 90a japana kongreso de Esperanto plurreligiejo

de Paul Desailly

La 90a japana kongreso de Esperanto, okazinta en Kameoka, apud Kioto, la 11-13an de oktobro 2003, kiel ĉiuj eventoj subtenataj de Oomoto, estis vere grandioza.

Dum postkongresa kafopaŭzo, en la sekretariato de la sidejo de Oomoto, tri estrinoj/jurnalistinoj de Ĉina Radio Internacia (Yu Jianchao), Radio Kubo (Maritza Gutiérrez González), kaj Radio Pollando (Barbara Pietrzak), konsentis kun me ke Japana Esperanto-Instituto kune kun Oomoto sukcese organizis kvazaŭ miniaturan Universalan Kongreson.

Pli ol mil esperantistoj el proksimume 15 landoj en modernega kongres-ejo atentis varian programon. Reinhard Selten, utiligante altajn teknologiaĵojn, faris sian faman prelegon pri Ludoteorio. SAT-ano Kreŝimir Barkoviĉ, kun kiu mi amikiĝis kaj dividis ĉambron dum du interesaj noktoj, spertege kaj sincere vivigis la libron de Karlo Ŝtajnet, 7000 tagoj en Siberio esperantigitan de la preleganto mem en malfacilaj cirkonstancoj. Ulrich Lins faris bonegan intervjuon.

Dianne Lukes faris trafajn demandojn publike tuj post la parolado de Kreŝimir, memoriĝis lin klarigi pri la havebleco de 7000 tagoj en Siberio en diversaj lingvoj. Ŝi ankaŭ sciigis nin pri la lastatempa forpaso de ŝia edzo, en Kvinslando, kiu estis ĉehdevena. Dianne kaj mi konsiliĝis kun adeptoj de Budhismo, Kristanismo, Oomoto, kaj Uonbulismo. Reciproke pluraj el ili ĉeestis nian bahaan kunsidon okazintan p.t.m. la 13an de oktobro.

Mi iomete atendigis la partoprenantojn de la baha kunsido, por donaci 15 minutojn al anoj de Rondo Familia.

Rimarkinte ke la nivelo de parolata Esperanto en nia grupo de proksimume 10 ĉeestantoj tre variis, mi apartigis la programerojn jene: (1) Parolado pri la historio, la principoj, kaj la internaciaj institucioj de la baha kredo; (2) Neformala sinprezento en kafopaŭzo, kun biskvitoj ktp. (En Seulo dum la 3a Azia Kongreso ni komencis la programon per kafo ktp., sed multaj aŭskultantoj ne sufiĉe regas Esperanton por koncentriĝi dum 90 minutoj sen paŭzo; (3) Prelego pri la kuneco de la baha kredo kaj la “Interna Ideo” de Esperanto, kaj la monda paco; (4) Demandoj kaj komentoj; (5) Disdonado de niaj literaturaĵoj en Esperanto kaj la japana.

Verŝajne mi ne toleros elspezi por aĉeti sopiratan domveturilon por esti vojaĝanta instruisto tra Ĉinio de Esperanto, ĉar mi vendis nur unu ekzem-

pleron de mia libro.

Laŭlonge de mia dorna vojo al Kameoka, mi pasigis pli ol semajnon en Jokohamo kaj Tokio, ĉar kvankam mia edzino, jam en la sepa monato de gravedeco, estas ĉina civitano, mi ankoraŭ bezonas vizon. Bedaŭrinde, sen mia antaŭscio, dum ses tagoj la ĉina ambasadorejo estis fermita pro nacia festo. Kion fari en la plejmultekosta urbo de la mondo, kiam de ses jaroj mi ricevas salajron en amata sed ankoraŭ ne riĉa Ĉinio?

Estis frakasitaj miaj planoj viziti Printempon, japanan amikon loĝantan en fora Fukuo, kiun mi renkontis en la 56a Internacia Junulara Kongreso en Hong Kong. Do, por ŝpari monon, mi pasigis unu nokton malkomforte en la flughaveno, kaj la duan sidante en interreta kafejo, sed mia san-stato suferis.

Efektive, tri noktojn sen lito mi lamente travivis ĉiĝoj en mia kvina vizito kiel esperantisto al la insuloj de Japanio. Savis min gesinjoroj Doi el Jokohamo kaj sinjorino Nakado kun sinjoro Numeta el Tokio, malavaraj gesamideanoj al kiuj mi suldas multon.

En ĉiu jardeko Japana Esperanto-Instituto kaj Esperanto Propaganda Asocio de Oomoto kune okazigas la Japanan Esperanto-kongreson. En la vespero antaŭ ol kongresi, Oomoto organizis apartan bankedon en luksa restoracio.

Dum la vespermanĝo la Kongresa Prezidanto, kiu menciende estas samtempe estro de Oomoto, sinjoro Deguĉi Kyotaro, petis min nome de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) oficiale paroli. Tuj post tio li mem prenis la mikrofonon por pli ekzakte sciigi tiujn amikajn interrilatojn inter Oomoto kaj BEL.

Okaze de la 90a Japana Esperanto-Kongreso mi estis distingita, kiel reprezentanto de la bahaa kredo, per la honoro sidiĝi sur la podio. Kelkajn minutojn post la ferma ceremonio mi donace ricevis superbela artisman fajencaĵon nome de la 5a Spirita Kunfondintino de Oomoto, Deguĉi Kurenai.

---

*(Daŭrigo de la artikolo pri Novkastelo sur paĝo 20):*

proponis sendi donacon de \$5000 dolaroj, kaj subteni iun de nia grupo por ĉeesti kongresojn dum la venontaj 5 jaroj

La NSKa Esperanto-Federacio sendis du skatolojn da libroj por ke mi povu pruntedoni ilin al niaj grupanoj. Inter tiuj estas la kasedokurso *Jen Nia Mondo, Teach yourself Esperanto, Step by Step in Esperanto, The History of the AEA* kaj aliaj libroj kiaj *Kredu min, Sinjorino*.



*Por Ridigi Vin*



Kruko kaj Jozefina konkubas dum multaj jaroj, kaj ĉio glatas. Subite Jozefina, legante romantikan viringazeton, diras: “Kruko, kial ni ne geedziĝu?”

Kruko respondas: “Ĉu vi frenezas? Kiu volus geedziĝi kun vi aŭ mi?”



# Edla Bakserp: Liaj paĝoj

## Speciala fuŝo farita de nia Reaktoro

En nia lasta numero de 2003, nia ĉionscia, ĉionpova, ĉielsenmensa Reaktoro sur paĝoj 6 kaj 7 diris ke la literumprogramon Aspell oni povas elŝuti ĉe la interreta adreso [www.....](http://www.....). Nu, mi provis tiun adreson, kaj kompreneble mia retlegila programo nomis min idioto kaj postulis ĝustan retadreson. Mi petis, pledis, ĉantaĝis, mortigis, kaj pluralimaniere klopodis devigi la Reaktoraran-aĉulon diri al mi la ĝustan adreson, sensukcese. Sed fine amiko mia flustris al mi ke la ĝusta adreso estas [www.aspell.com](http://www.aspell.com). Do nun ankaŭ vi scias; kaj nia Reaktoro ekscios, kiam li estos reviviĝinta.

## Nia intervjuo, parto 2

Regulaj legantoj de nia tutgalaksie fama periodaĵo sendube memoras ke en nia lasta numero de 2003 ni komencis aperigi intervjuon kun mi mem, faritan de la Reaktoro de *ESK*.

**Re:** Nu, unue mi deziras scii kial vi ĉiam nomas min Reaktoro kaj ne uzas mian veran nomon, Redaktoro.

**OB:** Via demando estas vere fascina, kaj tre volonte mi farus tre detalan eksplikon. Sed, laŭ mia memoro, la lasta temo en nia antaŭa paro de la intervjuo estis ke Aŭstralio estis parto de la eŭrop-azu-oceania kontinento. Ĉu vi ne deziras nun scii pli pri tio?

**Re:** Kiel diras Nero Wolfe, “*Fui!*”

**OB:** Per kiu li finas konversaciojn. Ĉu ankaŭ tion vi celas?

**Re:** Mi celas, deziras, volas, insistas, petas, postulas ke vi respondu al mia ĵusa demando pri la mankanta *d* en via nomo por mi.

**OB:** Nu, vi eble memoras — sed verŝajne ne, ĉar vi estas nun preskaŭ tiom aĝa kiel mi mem — ke iam, dum la nebula pasinteco kiam nia aŭgusta [**Re:** Nun estas la *januara* numero de *ESK*] [**OB:** Temas pri la kvalitadjektivo *aŭgusta*; legu en tiu *NPIV* kiun vi ŝtelis pasintjare de AEA kaj mem vidu.] [**Re:** Mi ja rigardis, ĝi diras ke Aŭgusto estas propra nomo.] [**OB:** Do la kompilintoj eraris; kaj min ne mirigas tio. Sed, se vi insistas, do “*eminenta*”] [**Re:** OK.]

**OB:** Dum la nebula pasinteco kiam nia eminenta revuo estis nomata *Aŭstralia Esperantisto* — ĉar mi ankoraŭ ne sciis ke niaj kuzoj en Novzelando volas legi kun ni. Ĝuste pro la fakto ke tiutempe Aŭstralio estis parto de la eŭrop-azu-oceania kontinento — Sed, ne, vi ne volas pensi pri tiu gravega fakto...

**Re:** Ŝajnas al mi ne vi nur babiladaĉas por plenigi la spacon kaj tempon, tiel ke vi ne intencas plenumi vian devon klarigi al mi pri tiu mankanta *d*.

**OB:** Neniel, neniom, neniam, kaj, krome, *tute ne*. Ni tiutempe disputis, vi kaj mi inter ni, pri iu misuzo de tiu litero, kaj mi proklamis ke ekde tiu tempo mi neniam denove ebligis la presigon de tiu mizera litero *d*.

**Re:** Sed vi ja uzas ĝin, oftege eĉ.

**OB:** Mi estas ekskobolda pingveno, kaj mi rajtas kapricagi laŭvole.

**Re:** Subite mi memoras: mi komencis nian intervjuon, antaŭ tiom da milisekundoj, per la demando: “Kiam kaj kiel vi fariĝis pingveno”. Kaj mi eĉ sekvigis tiun demandon per la vortoj “*Nepre ekspliku*”.

**OB:** Tion mi strebegas fari, sed vi konstante interrompas min.

Nu, la plejsimpla klarigo estas ke dum mi esploradis tiun eŭrop-azi-oceanian kontinenton, mi trovis ke iuj novzelanduloj filmas *La Mastron de la Ringoj*, kaj ĉar mi sciis ke neniu volos spekti filmon pri verko kiu aperos nur post kiu-scias-kiom da milionoj da jaroj, mi insistis ke ili ĉesigu sian filmadon tujege tuj. Kaj ili venĝe sorĉpingvenigis min.

**Re:** Pli malkredeblan klarigon mi tute neniam aŭdis.

**OB:** Dankon.

**Re:** Mi ne intencis laŭdi vin. Sed, nun alieme: Oni ankaŭ tre ofte demandas pri viaj tre multaj eminentaj antaŭaj kaj aktualaj neparencoj. Kiel povis okazi, ke via familio akiris tiom da eminentaj neparencoj?

**OB:** Plezurigas min ke vi tion demandis. Kiel vi scias, kiam mi estis grifelo en la mano de la mastrofilozofo Platono, ankaŭ li demandis al mi la samon. Ĉu vi scias ke ankaŭ Artistotelo, tre influa kaj talenta filozofo, ankaŭ estis neparencio mia?

**Re:** Tion mi ne sciis, sed ne mirigas min.

**OB:** Ankaŭ la inventinto de la aŭtomata pizsenŝeligilo ne estis parencio mia. Ili ja abundas, tiuj neparencoj. Sed mi ne volas fanfaroni pri tio.

**Re:** Tute prave. Sed se vi naskiĝis antaŭ tiom da milionoj da jaroj, kiel<sup>(daŭrigota)</sup>

---

## Famaj neparencoj de Odlo Bokserp

### *Elenjo*

Elenjo estis nur juna elefanto kiam ŝi decidis konkeri la romian imperion en la jaro -217. Tiucele ŝi kolektis grupon de 36 aliaj elefantoj por formi “ŝok- kaj -mir”-korpuson. Kvankam ankoraŭ juna, Elenjo estis bone edukita en la Uni-versitato de Kartago, kie — estante azia elefanto — si estis multe admirata ne nur pro siaj belo kaj orienta saĝo, sed ankaŭ pro sia kompreno de la militarto, ĉar ŝi estis diplomita studinto de la Reĝo de Siamo Mem.

Sciante ke la homoj en Romo ne parolas la elefantan lingvon de Kartago, kiu estas en Afriko, nek la siaman lingvon, Elenjo decidis dungi interpretiston por sia kampanjo. Tiucele ŝi trovis viron nomitan Hannibal, kiu bone parolis latine, kaj transportigis lin per afrika elefanto el la kampanjobando. Feliĉe, originalaj fotoj pri ŝi, ŝia filineto, kaj la afrika elefanto portanta Hannibalon estas konservataj en la vatikana elefantobiblioteko:



# La Aŭstralia Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.au>

Prezidanto: Matthew Maguire, 9 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101.

Vicprezidantoj: Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. [esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au)

Terry Manley, 50 Alagalah St NE 55, Narromine NSW 2821. [teren@mail.ans.com.au](mailto:teren@mail.ans.com.au)

Sekretario: John Gallagher, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. [abcetc@ozemail.com](mailto:abcetc@ozemail.com)

Helpsekretario: Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401. [hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

Kasisto: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. [pitney@goldenit.net.au](mailto:pitney@goldenit.net.au)

Helpkasisto: Ken Rolls, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. [kenjohnrolls@yahoo.com.au](mailto:kenjohnrolls@yahoo.com.au)

**Kotizoj:** \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto de AEA.

# La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: Bradley McDonald, ĉe la asocia adreso. [bradley.m@xtra.co.nz](mailto:bradley.m@xtra.co.nz)

Sekretario: Howard Gravatt, ĉe la asocia adreso. [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

Kasisto: Jackie Fox, ĉe la asocia adreso.

**Kotizoj:** \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

# Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6392, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937. 📠 (08) 9641 1134. [sudakruco@sudaakruco.org](mailto:sudakruco@sudaakruco.org)

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK*. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ESK*: por membroj de AEEA kaj NZEA, po \$Aŭ3+poŝtsendkosto; por nemembroj, \$Aŭ4.25+poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto aeal-w ĉe UEA, de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2004 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu gazeto estas © 2004 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas menciita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparo uzita estas Times. La reteldono estas preparita per Acrobat.

## Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Boksep, I.N.K., K.R.A.J.O.N, K.R.E.T.

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

[Lia multsuferanta Kontrolinto, Dumviva Honora Agoblagotago-Membro Nepra]

Wholly Printed in Australia

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 642, York W.A., Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undelivered, return reply paid to:

D. Broadribb  
PO Box 643  
York WA 6302  
Australia

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO  
Vol. 12, no. 1, Januaro-Februaro 2004

Print Post Approved  
PP63 1048/00005

**SURFACE  
MAIL**

**POSTAGE  
PAID  
AUSTRALIA**